

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Jarabono : 40 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauviniere
44 - Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

MARTO - APRILO

1979 - 2

KULTURAJ KAJEROJ

1979 MARTO - APRILO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo — A. Frangeul

Balzac en Anjou — B. Cheverry

Eŭgena Grandet (eltiraĵo) — H. Balzac, trad. E. Motillon

Raporto pri la Printempa Semajno en Grésillon

Kion enhavas la universo ? Riri — A. Masclet

Insulae Fortunae — E. Motillon

Fotografado - Fotografaĵo - Fotografio — W. Grela

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

El Grésillon

IOM DA HISTORIO

Ĉar ni ofte konstatas, ke multaj esperantistoj ĉefe eksterlandanoj, ne konas la historion de la Esperanto-Domo Gresillon, ni intencas aperigi kelkajn partojn el la libreto « Naskiĝo de Esperanto-Domo ». Ĉi sube vi legos eltiraĵon el la enkonduko de tiu libreto.

La kastelo Gresillon situas en tre malnova franca regiono ankoraŭ fidele nomata Anjou (Anĵu). Tie megalito, aparte belaj dolmenoj, atestas la ekziston de tre antikva loĝantaro, kaj de post la Roma okupado, la loka historio mencias multajn faktojn, kiuj grandskale eniris la francan historion.

En la nuna departemento Maine-et-Loire, kiu ŝuldas sian nomon al la du ĉefaj trapasantaj riveroj, la bieno Gresillon 17 hektarojn ampleksa, kuŝas ĉe la limo inter Baugé, malnova kaj histoririĉa urbeto, kaj Pontigné, kampara komunumo. Diplomo de la epoko de Karlo la Granda montras, ke de la oka jarcento la distrikto Podenticianus (Pontigné) kaj najbaraĵoj apartenis al la fama abatejo de Sankta Marteno de Tours. Je la 12-13-a jarcentoj, altnobeloj el Le Lude konstruis, sur la episkopa teritorio la belan preĝejon, kies dimensioj kaj stilo atestas la iaman gravecon. Pri tiu komunumo Pontigné, en departementaj arkivoj, oni retrovas postsignojn de interna bieno « La Rondellière », kiu poste dispartigita naskis « La grandaj Kampoj ». Nur en 1585 oni konstruis unuan kastelon jam nomitan « Gresillon » (el la malnova franca lingvo : grilo-kantado) sur parto de tiuj Grandaj Kampoj. La mason-mastro René du Chesnel konstruis ĝin por « Honorinda Sinjoro Julien Lebigot », kiu donacis ĝin, kiel doton, al sia edzino Jeanne Lebigot. En 1634, la bieno apartenis al Angelique Bellet kaj en 1685 al Sinjoro René de Cherbonnière.

Tempo forpasis. Iom post iom la kastelo ruiniĝis. Je la fino de la 19-a jarcento, post incendio, la tiama posedanto decidis rekonstrui ĝin por ke la bieno ne estu dispecigita de la heredantoj. Tiam la nova konstruaĵo estis starigita iom antaŭ la malnova por konservi ankoraŭ firmajn murpartojn nun konsistigantajn parton de la kuirejo. Tre bela renesanca kameno el skulptita ligno, kiun oni admiras en manĝo-ĉambro, ne apartenas al la antaŭa kastelo, kvankam ĝi estas samaĝa. La enĉizitaj datoj : « 1634-1882 » atestas la originon kaj reinstaladon de tiu kameno en la ĵusrekonstruita Gresillon.

Esperanto tra la Mondo

Tutlanda asocio fondita en Sovet-Unio

En la esperanta vivo de la sovetaj esperantistoj, okazis evento depost longe atendata : la 14an de Marto, en Moskvo, estis fondita Asocio de Sovetaj Esperantistoj. Ĉeestis cento da delegitoj kaj multaj gastoj en tiu tutlanda konferenco, en la sidejo de la Unio de la Amikecaj Asocioj de U.S.S.R.

Dum la konferenco, estis aprobitaj la statutoj de A.S.E., planoj de la lernoprogramo, eldona agado, k.t.p.

Oni intencas eldoni lernolibrojn, vortarojn, beletrajn librojn kaj du gazetojn (Unu estos ruslingva).

Kiel prezidanto, estis elektita D-ro Mahomet Isaev, eminenta lingvisto kaj esperantologo.

Oni ankaŭ kreos asociojn en la diversaj respublikoj de U.S.S.R. Oni supozas ke, nuntempe, estas proksimume 10 miloj da aktivaj geesperantistoj en U.S.S.R.

Ne utile akcenti ke tiu fondo havos verŝajne gravajn konsekvencojn por la disvolviĝo de la esperantomovado en diversaj landoj.

En Ĉinio

En tiu lando ankaŭ, la vekiĝo de la esperanto-movado estas konfirmita. La konstanta konsilantaro de Ĉina Esperanto-Ligo kunvenis fine de Februaro kaj diskutis, inter alie, pri la problemo de reciproka vizito inter ĉinaj kaj eksterlandaj esperantistoj.

La monata kaj ampleksa ilustrita revuo « El popola ĉinio » liveras nun artikolojn ĝenerale interesajn kaj variajn por senkonkurenca prezo.

Se vi deziras japanajn korespondantojn

Vi povas skribi, indikante la necesajn informojn pri vi kaj viaj deziroj, al unu el la jenaj adresoj :

— Japana Esperanto-Instituo, Waseda-Mati 12-3, Sinzyuku-Ku, Tokio 162, Japanujo.

— Japana Esperanta Koresponda Servo, ĉe KLEG, Sone-Higasi 1-11-46-204 Toyonaka-Si 561, Japanujo.

Granda kaj altklasa ekspozicio en Svisujo

Dum tri monatoj, estis prezentita, en la nacia ekspozicio, en Berno, vasta ekspozicio titolita « Esperanto kaj interlingvistiko en Svisujo ». Ĝi konsistis el kvindeko da paneloj kaj kvindeko da vitrinoj.

Post prezentado en la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds, la ekspozicio « migros » dumkongrese al Lucerno kaj poste al Baselo.

Krome, ĉar la paneloj estas faritaj el fotomaterialo, eblos reprodukti ilin, samgrande aŭ redukte.

Novaj libroj

— « Praktika bildvortaro de Esperanto », eldonita de Oxford University Press. 96 paĝoj, 2000 vortoj kun koloraj bildoj.

— El Japanulo, venis du libroj : « Japana variacio » (originala antologio, dudek-unu aŭtoroj, prozaĵoj, poemoj, eseoj), kaj : « Lazur'kristala kaj pluv-susura » : utaaro (poemaro) de Masayuki Kudora.

— « La kanto pri la fajr-ruĝa floro ». Romano de Johannes Lunnankoski, tradukita el la finna lingvo.

— « La kato en la sako ». Legolibro por infanoj. Originalliteraturo de bonaj esperantistaj aŭtoroj. Redaktis Benczik.

— « Esperantologiaj studoj » de Wüster. Redaktis Haupenthal. 254 paĝoj.

— « Lumo de orienta Eŭropo ». Poemo de Vladimir Beekman ; el la estona lingvo, tradukis H. Dresen, Ojalo kaj Saha.

— « Elektitaj fabloj » de Krilov. El la rusa tradukis S. G. Rublov.

— « Antologio de argentinaj noveloj ». 200 paĝoj.

— Kaseto stereofona (50 minuta) : « Danĝera ul' ». Kantas jak Lepuil'. 11 protestkantoj modernaj, kun tekstlibreto, illustrita de Serĵ Sire.

La koreanoj ankaŭ volas korespondi...

Skribu al : Korea Esperanto-Asocio, CPO-Kesto, Seoul-100, Korea Respubliko.

Ĉu vi jam konas « Homo kaj kosmo » ?

Se vi interesiĝas pri nia universo, eĉ se vi ne estas fakulo, ni atentigas vin pri tiu bonega revueto, subtitolita « Astronomia esperanto-revuo ».

Vere, ĝi nur aperas 2 aŭ 3 fojojn en la jaro, sed la membroj de la astronomia observatorio de Zagreb, kiuj aperigas ĝin, havas la arton, en la artikoloj, resti je la nivelo de la simpla amatoro de sciencoj... kaj eliri el la mallarĝa kadro de difinita fako. Do, nepre subteninda entrepreno.

En la pola radio

Dum Marto, la tutlanda programo de pola televido elsendis unuhoran programon pri la praktika utiligo de la internacia lingvo. La elsendo estis farita en la populara ciklo « Ekrano de raportistoj ».

Libertempi dum Septembro...

En Sete (Francujo), 16an - 23an de Septembro, renkontiĝo en apudmara feriejo. Esperanto-kursoj, posttagmezaj ekskursoj. Informas D-ino Y. Vierne, 5, rue Dr Roux, F-34000 Montpellier.

Universala Medicina Esperanto-Asocio

Se vi estas koncernata, notu ankaŭ ke D-ino Vierne akceptas, por Francio, la kotizojn de tiu asocio (kun abono al « Medicina Internacia Revuo » : 43 FF aŭ 47 FF por aerpoŝta sendo, je ŝia nomo, pĉk 208-88 A Montpellier). Sekretario por Eŭropo : D-ro Imre Ferenczy, poŝtfako 143, H-9002 Győr 2, Hungario.

Ĝenerala sekretario : Prof. D-ro Saburo Yamazoa, Iwagami-machi 48-9 Maebashi-si, Gunma-ken, 371 Janulo.

Rondo de libro-apogantoj

Se vi volas ricevi unu libron monate kun ebleco resendi ĝin, rilatu pri tiu projekto kun : Rondo de libro-apogantoj, Heideweg 20, B-2120 Schoten (Belgio).

Balzac en Anjou (pr. Anju)

Kial tiu titolo ? Fakte, ĝi povas aspekti sufiĉe stranga al kiuj bone scias, ke la fama franca verkisto naskiĝis en la ĉefurbo de Turanĝio kaj, de la adoleskanteco, plej ĝenerale, vivis en Parizo. Tion jam klarigis al la legantoj de Kulturaj Kajeroj (nº 3-1960) S-ro Motillon li mem Tur-ano kaj erudiciulo koncerne Balzac kaj ties verkaron.

Do, kial limigi hodiaŭa priskribon al « Balzac en Anĵu » ? Tute simple por reelvoki tiun famulon pere de unu el liaj ĉefverkoj « Eugénie Grandet » kies kadro situas en la urbo Saumur ne malproksima de Gresillon kaj tiel, kune, kunreveni en nian provincon ĉe la epoko de la rakontoj.

Kompreneble, en la daŭro de preskaŭ du jarcentoj multegaj detruoj, ŝanĝoj, renovigadoj okazis kiuj grandskale transformis la tieajn vivmanierojn. Sed, dumtempe, ĉu la homoj tiel ŝanĝiĝis ? Ŝajnas ke ne. Tie kiel alie, la samaj pasioj daŭre gvidas ilin eĉ se la celoj, formoj, eksteraj elmontroj ne tute similas tiujn de la praavoj. Verŝajne, la avareco de la « Patro Grandet » povas montri al nunaj junuloj strangajn aspektojn, tamen, nedube, ĉiam restas avidaj homoj pretaj amasigi proprajn superecajn posedaĵojn. Aliparte, tiu Balzac-priskribo kiu revenigas nin ĉe epoko de Franca post-revolucio despli sentigas la naivecon de samtempuloj kiuj povis revi je nepra samegala dispartigo de bienoj reprenitaj de antaŭaj riĉuloj. Ĝi elmontras kiel la plej avidemaj, aŭdacaj, homoj iumaniere klarvidaj kaj sen troaj konscienc-riproĉoj, sukcesis repreni por si ion eltiratan de aliaj.

En sia tuta verkaro, Balzac sciis ekvidi la tiamajn fortojn elspruĉantajn el nova socia vivo kaj ilin redoni per trafaj priskriboj pri tiamaj banka, politika, gazetara, komercada mondoj. Konsekvence, en siaj romanoj, Balzac donis vivon al multegaj plej tipaj personaĵoj rapide tiel familiaraj kiel Molier-herooj.

Nia Anĵu-ano, la patro Grandet, estas, li, tipa avarulo. Antaŭa barel-manfabrikanto, li sukcesis montri al siaj samurbanoj bonaniman patriotecon profitante tiamajn okazaĵojn de post-revolucia epoko por reaĉeti, plej bonkondiĉe, klerikarajn aŭ nobelarajn bienojn kaj, tiel, amasigi sufiĉe rapide mirindegajn riĉaĵojn.

Tamen, ĉar ege avara, en la romano, li daŭre vivas preskaŭ mizere en malluma domo de malnova Saumur-kvartalo ambaŭ ege bone priskribitaj de Balzac. Li tiranas siajn kunulojn, nur inojn : palan edzinon submetitan al kompleta sklaveco, servistinon pli defendeman sed blinde sindoneman al la juna obeema fraŭlino Eŭgena, kies amo al la Pariza kuzo alterne lumigos kaj nigrigos la romanon.

Povas surprizi nin la fakto, ke Balzac denaske malŝparema, luksamanta, vivoplena estu altirata de avarulo. Sed, plenvivante sian epokon li aŭdacas pensi, ke estas aliaj pasioj ol amo aŭ amoro, aliaj dramoj ol tiuj de malfeliĉaj geamantoj. Al siaj legantoj, li nepre deziras malkovri la tiamajn pasiojn kaj elmontri ke dum sociaj krizoj riĉeca supereco, pli ol amo aŭ amoro, gvidas la hom-aspirojn.

En Saumur, okaze de vizitoj al amikoj, venanta el Saché lia kutima rifuĝejo kiam diverskaŭze lacigita de la pariza vivo, li trovos la « Patro Grandet » en plej tipaj kadro kaj etoso. Ĉu vere tiun de li priskribita ? Ne tute, kompreneble. Se la kadro kaj etoso mem estas plej fidele rekreitaj, la romanisto ne povis lasi silenta sian konsiderindan imag-povon. Sekve, ne ĉiuj trajtoj de lia avarulo koincidas kun tiuj de la modelo, ankaŭ juna manlaboristo iĝinta samkondiĉe kiel Grandet famkonata Saumur-bankisto, poste edzo kaj patro de bonedukita fraŭlino. Kun tiu S-ro Nivelleau li persone interrilatiĝis, multe aŭskultis kaj observis por el tiaj valoraj trezor-fontoj krei « sian » personaĵon. Same pri Eŭgena, kiu laŭŝajne, ricevis de Balzac multajn trajtojn de sia pola amatino Eva de Hanska. Tiaj aranĝoj apartenas al la aŭtoro.

Restas, ke liaj fidelaj priskriboj pri lokoj kaj momentaj etosoj ne povas ne alporti pliajn altirojn al vizitantoj de tiu parto de la Loire-baseno, tiel amata de la verkisto.

Ĉi-rilate, ankaŭ la vizito de la Balzac-muzeo en Saché, apud Azay-le-Rideau estas ege interesa.

Eltiraĵo el 1978 — parolado en Gresillon, kiel enkonduko al tuttaga ekskurso.

B. CHEVERRY.

Eŭgena Grandet

de HONORE DE BALZAC (1)

La romano debutas per la ĉi-suba priskribo de la malnova urbo Saumur, je la komenco de la 19a jarcento.

oOo

En iuj provincaj urboj troviĝas domoj, kies vido instigas melankolion egalantan tiun naskitan de la plej mallumaj klostroj, de la plej senkoloraj erikejoj aŭ de la plej tristaj ruinaĵoj. Eble samtempe en tiuj domoj, la silento de la klostro, la malfekundeco de la erikejoj, kaj la skeletoj de la ruinaĵoj en sia vivo kaj moviĝo estas tiel kvietaj, ke fremdulo kredus ilin neloĝataj, se li ne subite renkontus la malluman kaj malvarman rigardon de senmova persono, kies duon-monaheca vizaĝo aperas super la fenestra apogilo, pro la bruo de nekonata paŝo. Tiuj melankoliaj principoj aperas en la aspekto de loĝejo situanta en Saumur ĉe la ekstremo de la ascenda strato (2) kiu kondukas al la kastelo, tra la supro de la

(1) Prononcu « grande' » kaj « balzak' ».
(2) Nuntempe : rue du Fort (strato de la Fuorto).

urbo. Tiu strato, nun malmute trairata, varma dum somero, malvarma dum vintro, malluma en kelkaj lokoj, estas rimarkinda pro la sonoreco de sia ŝtoneta pavimo ĉiam pura kaj seka, pro la mallarĝeco de sia serpenta vojo, pro la paco de siaj domoj situantaj en la malnova urbo kaj superataj de la remparoj. En ĝi trijarcentaj domoj estas ankoraŭ solidaj, kvankam konstruitaj el ligno ; kaj iliaj aspektoj kontribuas je tiu originaleco ŝatata de la antikvistoj kaj artistoj. Estas malfacile preterpasi tiujn domojn sen admiri la enormajn trabojn, kies ekstremaĵoj estas ĉizitaj el strangaj figuroj, kaj kronas per nigra bareliefo la teretaĝon de plej multaj el ili. Ĉi-tie oblikvaj traboj tegitaj de ardezoj desegnas bluajn liniojn sur la malfortaj muroj de loĝejo finiĝanta per tegmento el solivoj kurbigitaj de la jaroj, kaj kies putritaj ŝindoj tordiĝis pro la alterna agado de pluvo kaj suno. Tie montriĝas eluzitaj nigriĝintaj fenestro-apogiloj, kies delikataj skulptaĵoj estas apenaŭ videblaj, kaj kiuj ŝajnas tro malfortaj por la poto el bruna argilo el kiu elkreskas la diantoj aŭ rozoj de malriĉa laboristino. Iom pli fore, estas pordoj garnitaj de enormaj najloj sur kiuj, la genio de niaj prapatroj desegnis domajn hieroglifojn, kies senso estas por ĉiam neeltrovebla. Ie, protestanto subskribis sian fidon (3), alie, katoliko malbenis Henrikon 4an (4). Iu burĝo gravuris la insignon de sia **magistrata nobeleco.** Tie troviĝas la tuta historio de Franclando. Apud nefortika domo kun krude masonitaj flankoj kaj kie metiisto nobligis sian rabotilon (4), staras nobela domo sur kies arko de la ŝtona pordo vidiĝas ankoraŭ kelkaj restaĵoj de la blazono disrompita de la diversaj revolucioj, kiuj agitis la landon ekde la jaro 1789a.

En tiu strato, la komercaj teretaĝoj estas nek butikoj, nek magazenoj. Amikoj de la Mezepoko tie retrovus la « laborejon » de niaj prapatroj en ĝia tuta simpleco. Tiuj malaltaj ĉambroj, kiuj havas nek butikan aŭ montran fenestron, nek vitraĵojn, estas profundaj, mallumaj, sen internaj aŭ eksteraj ornamaĵoj. La pordo estas tranĉita laŭ du krude fermantaj, senvitraj partoj, kies supera parto faldiĝas al la interno ; kaj la malsupra parto provizita de risorta sonorilo, konstante fermiĝas kaj malfermiĝas. Aero kaj lumo envenas en tiu speco de kaverno humida, ĉu tra la supro de la pordo, ĉu tra la spaco troviĝanta inter la volbo, la planko, kaj mureto sufiĉe alta por ke oni povu apogi sin sur ĝi. Al tiu muro estas fikseblaj du fortikaj ŝutroj, deprenitaj matene, refiksitaj vespere ; kaj kuntenitaj per boltitaj feraj stangoj. Tiu muro estis uzata por elmontri la varojn de la komercisto. Tie estas nenia ĉarlatanismo, la specimenoj konsistas el du aŭ tri tinoj plenaj de salo kaj laberdano, kelkaj pakaĵoj de veltolo, ŝnuraĵoj, latuna drato pendanta de la solivoj, de la plafono, barelaj ringoj kontraŭ la muroj, aŭ kelkaj drapaj rulaĵoj sur bretoj. Eniru. Pura junulino, juna, pimpa, kun blanka ŝultroskarpo, ruĝaj brakoj, delasas sian trikoton, vokas sian patrinon aŭ sian patron, kiu venas, kaj vendas al vi laŭ via deziro, flegme, komplezeme, arogeme — laŭ sia karaktero — ĉu dek centimojn, ĉu dudek mil frankojn da varoj...

Tradukis E. MOTILLON.

(3) Dum la 16a jarcento, Saumur fariĝis tre grava centro por protestantismo.

(4) Per skulptaĵoj sur la maro.

Ni forgesis...

En la lasta numero de Kulturaj Kajeroj (1979, n° 1), ni forgesis informi niajn legantojn pri la fakto ke la teksto **« Vojaĝo al la centro de la tero »** estas **traduko de Sro E. Motillon.** Ni petas ke nia amiko bonvolu senkulpigi nin por tiu eraro.

KION ENHAVAS LA UNIVERSO ?

Nia planedo ŝajnas al ni grandega. Tuta vivo ne sufiĉas por viziti ĝin tute. Tamen, je universa skalo, la tero estas nur polvereto. Kaj la homoj sin demandas kia estas la spaco kiu ĉirkaŭas nin. Ĉu ekzistas aliaj planedoj kiel la nia, aliaj sunoj kiel la nia, aliaj raciuloj kiel ni ?

Por ni, teranoj, la proksima horizonto estas la limoj de la sunsistemo.

LA SUNSISTEMO

Ĝi konsistas el la suno, la naŭ planedoj kaj la astroidoj. Tiuj planedoj (Merkuro, Venuso, Tero, Marso, Jupitero, Saturno, Uranuso, Neptuno kaj Plutono) estas « senvivaj » astroj ĉar ili ne plu transformiĝos dum sia ekzistado. Estas relative malvarmaj astroj. Ili ne sendas propran lumon sed precipe resendas tiun kiun ili recevas de la suno. Male la suno estas « vivanta » astro. Ĝi multe transformiĝos dum la estonteco. Ĝia venonta formŝango estos pereira por la homaro. Ĝi finos sian vivon sub tute alia formo ol tiu, kiun ni hodiaŭ vidas.

En ĝi okazas fortegaj nukleaj reakcioj kiuj donas al ĝi ĝian lumon kaj faras de ĝi grandegan fonton da energio kiun ĝi radias. Ĝi estas la plej proksima ekzemplo de tio kion oni nomas stelo.

Estas miloj da steloj kiujn oni vidas nokte. Ili ŝajnas punktoj pro sia grandega malproksimeco. Per nuraj okuloj oni povas vidi ĉirkaŭ 6000 stelojn kaj pli ol 50 000 per binokloj.

En la daŭro de homa vivo, kiu estas tre mallonga laŭ kosma skalo, ili ŝajnas senmovaj en la ĉielo. La plej brilaj formas desegnaĵojn al kiuj la homa imagpovo donis nomojn de bestoj, de objektoj aŭ de mitaj personoj : estas la konstelacioj.


Oni nombras 88 konstelaciojn.

Sed la steloj kiuj apartenas al sama konstelacio tute ne estas ligitaj inter si, eĉ ne estas proksimaj unu de la aliaj. Nur la perspektivo metas ilin en la sama regiono de la ĉielo.

KIO ESTAS STELO ?

Stelo estas globo da inkandeska gaso, en kiu okazas nukleaj reakcioj kaj kies temperaturo estas minimume pluraj milionoj da gradoj. La steloj vivas ; ankoraŭ nun ili naskiĝas, maljuniĝas kaj mortas. La materio de la Universo sin prezentas parte en formo de steloj. Estas grandega kvanto da steloj. La nombro estas neimagebla ni diru miliardoj da miliardoj da miliardoj ! ! !

La restaĵo de la universa materio, kiu ne estas densigita en la steloj, konstituas la interstelan kaj intergalaksian medion. Ĝi konsistas el nuboj de gasoj kaj polvoj tre maldensaj.



Ankaŭ nomita la nebulozo de la krabo. Estas la restaĵo de stelo kiu eksplodis en la jaro 1054. Ĝi estas videbla en la konstelacio de la Virbovo

KIEL NASKIĜAS STELO ?

La Universo estas gigantega spaco kiu enhavas tie kaj tie-ĉi materion pli aŭ malpli densigita. Hidrogeno estas la plej abunda elemento (ĉirkaŭ 70 % el la tuta maso kontraŭ iom malpli ol 30 % da heliumo).

Laŭ la regionoj de la Universo, la maso je volumo multege varias. En la plej malplenaj regionoj la voluma maso estas nur 10^{-20} ĝis 10^{-30} g/cm3 (10^{-24} g/cm3 signifas 1 atomo/cm3) sed ĝi atingas pluraj centoj da milionoj da tunoj/cm3 en la plej densaj objektoj.

Jen la procezo de transformado de gasa nubo en stelon : sub la influo de la gravito la nubo maldilatiĝas. Tio varmigas la centron de la nubo. Kiam la temperaturo atingas milionojn da gradoj, la kunfandiĝo de hidrogeno en heliumo komenciĝas. (4 nukleoj da hidrogeno kunfandiĝas por krei unu nukleon da heliumo) kaj kreas gigantegan energion.

La evakuado de tiu energio sub formo de radiadoj haltigas la maldilatiĝon kaj igas la stelon videblan. Tiu fazo el la stela vivo estas la plej longa. Ĝi finiĝas kiam ne plu estas hidrogeno en la kerno de la stelo. Tiam la stelo pligrandiĝas (la diametro povas esti centfoje multobligita) kaj iĝas ruĝa giganta stelo kaj poste...

LA MORTO DE LA STELOJ

La fina sorto de la steloj dependas de ilia maso.


La steloj, kies maso estas malpli ol unufoje kaj duono la maso de nia suno, transformiĝas el ruĝaj gigantaj steloj en « blankajn nanojn ». Tiel oni nomas malgrandan astron (de la diametro de nia tero aŭ eĉ malpli), kies voluma maso atingas plurajn tunojn/cm3. La lumeco kaj la temperaturo de tiuj blankaj nanoj malgrandiĝas iom post iom kaj ili malaperas kiel lumaj astroj.

La plej masivaj steloj ne iĝas blankaj nanoj sed fortege eksplodas, forĵetante parton de sia materio en la spacon kaj lasante densegan restaĵon (neŭtronaj steloj aŭ nigraj truoj). Oni nomas supernovaj la stelojn en tiu eksploda fazo. En la daŭro de kelkaj tagoj ilia brilo multege pligrandiĝas. Oni eĉ povas vidi ilin tage. Sed tio malofte okazas : ĉirkaŭ unufoje en tri jarcentoj en nia galaksio (la lastan oni vidis en 1604). Kiam la maso de tiaj steloj estas inter unufoje kaj duono ĝis dufoje kaj duono la suna maso, la restaĵo de la eksplodo konsistas precipe el neŭtronoj, tial oni nomas ilin neŭtronaj steloj. La voluma maso atingas plurajn milionojn da tunoj/cm3.

La materio elĵetita en la spacon formas nebulozon.

Kelkfoje la neŭtronaj steloj elsendas tre regulan radiadon. Tiam oni nomas ilin pulsantaj steloj (en la angla lingvo : pulsar). La unuan oni malkovris en 1967.

Kiam la maso estas pli granda ol dufoje kaj duono la suna maso, la maldilatiĝo ne haltas kaj kondukas al objektoj kiujn oni nomas « nigraj truoj ». Tiaj astroj estas tiel densegaj ke eĉ la lumo ne povas eskapi. Do oni tute ne povas kaj povos vidi ilin.



Amaso da steloj en la konstelacio de Herkulo. Tiu globforma amaso enhavas 20 000 steloj. Ĝi estas bone videbla per binokloj.

KELKAJ KARAKTERIZAĴOJ DE LA STELOJ

La grandeco de stelo dependas de ĝia maso kaj de ĝia aĝo. La radiuso povas esti nur kelkaj kilometroj (neŭtrona stelo) ĝis dumilfoje la radiuso de nia suno (ĉirkaŭ 700 000 km). La maso de stelo povas esti centono ĝis centoblo la suna maso (ĉirkaŭ 2.10^{27} tunoj). Pli malgranda, la nukleaj reakcioj ne povas okazi, pli granda, ĝi tuj eksplodas.

La steloj enhavas varmegan kernon ĉirkaŭitan de gasa envolvaĵo pli aŭ malpli densa kiun oni nomas atmosfero.

En la kerno, la temperaturo varias de kelkaj milionoj da gradoj. Tamen la ekstera temperaturo, tiu de la atmosfero, kiu elsendas la radiadon, kiun ni kaptas, estas malpli granda. 35 000 gradoj por la bluaj steloj, 10 000 por la blankaj, 6 000 por la flavaj (kiel nia suno) kaj 3 000 por la ruĝaj.

La vivo de stelo daŭras de kelkaj milionoj da jaroj ĝis pluraj dekmil milionoj.

Dum sia vivo stelo fabrikas kemiajn elementojn kiujn ĝi elĵetas en la spacon kiam ĝi eksplodas. Tiuj elementoj poste partoprenas la formiĝon de novaj steloj kaj planedoj. Ĉiuj elementoj de nia tero estis fabrikitaj en steloj hodiaŭ malaperinta. Tial oni povas diri ke ĉiuj el ni estas ekstrateranoj ! ! !


GRUPIĜO DE LA STELOJ

Tre malofte la steloj estas izolitaj en la spaco. Sub gravita influo ili kuniĝas en amasoj kiuj enhavas de centoj ĝis pluraj miloj da steloj.

Sed kie troviĝas tiuj steloj ?

Antaŭ ol ilin, serĉi oni devas adopti novan longecan unuon. La astronomoj uzas la lumjaron. Estas la distanco trairita de la lumo dum unu jaro je la rapideco de 299 792 km/s. Unu lumjaro valoras 9 460 000 000 000 kilometrojn !

La plej de ni proksima stela sistemo staras je 4,3 lumjaroj. Estas sistemo de tri steloj enhavanta la stelon nomitan ALFA de la konstelacio Centaŭro. Poste pli malproksimaj oni trovas la BERNARDAN stelon je 5,9 lj, WOLF 359 je 7,7 lj, kaj el la plej brilaj SIRIUSO (ALFA de la Granda Hundo) je 8,7 lj, PROCIONO (ALFA de la Malgranda Hundo) je 11,3 lj, ALTAIRO (ALFA de la Aglo) je 16,5 lj ktp... Same oni malkovras miliardojn da steloj ĝis 50 000 lj kaj poste nenion.



Bela ekzemplo de spirala galaksio enhavante centojn da miliardoj da steloj. Ĝi staras je 12 000 000 lj en la konstelacio de la ĉashundoj.

Tiuj steloj formas la laktan Vojon. Tiel oni nomas nian galaksion. Ĝi estas diskoforma kun tubero en la centro. Nia suno staras je 30 000 lj de la centro.

La Lakta Vojo rotacias en 250 milionoj da jaroj kaj enhavas centon da miliardoj da steloj kaj ankaŭ nubojn da gasoj kaj polvoj.

MULTEGO DA GALAKSIOJ


Nia galaksio ne estas unika. La plej proksimaj galaksioj estas la Malgranda kaj la Granda MAGELLANAJ nuboj kiuj staras je ĉirkaŭ 170 000 lj. Ili estas tiel proksimaj (laŭ kosma skalo) ke oni konsideras ilin kiel satelitojn de nia galaksio.

Alia fama najbaro estas la galaksio de Andromedo (ankaŭ nomita M 31, tio signifias ke ĝi havas la numeron 31 en la katalogo farita de la franca astronomo MESSIER) je distanco de iom pli ol 2 000 000 lj.

Andromedo kaj la Magellanaj nuboj estas videblaj per nuraj okuloj de nia tero. En la najbareco de nia galaksio oni trovas dudekon da galaksioj kiuj formas la Loka Grupo. Ĝi plenigas sferon ĉirkaŭ 5 000 000 lj diametran.

Aliaj grupoj da galaksioj ekzistas. La plej proksima, la grupo de la Virgo staras je 36 millionoj da lj enhavas pli ol dumil galaksiojn.

La plej grandaj teleskopoj povas foti plurajn centojn da milionoj da galaksioj. Sed, de kie venas la materio kiu plenigas la universon ?



Hidrogena nubo lumigita de varmegaj junaj steloj. Ĝi staras je 1 200 lj kaj estas videbla per la nuraj okuloj en la konstelacio Oriono dum vintro.

ĈU LA UNIVERSO ETENDIĜAS AŬ NE ?

Antaŭ 50 jaroj oni proponis teorion pri la evoluo de la universo. Sed ĉiuj astronomoj ne akordiĝas kun tiu teorio.

Laŭ tiu teorio (nomita la Granda Eksplodo) la tuta energio de la universo estis koncentrita, antaŭ 15 miliardoj da jaroj, en tre malgranda spaco, kies temperaturo estis ĉirkaŭ cent miliardoj da gradoj. La eksplodo de tiu nukleo forĵetis la energion en la spacon kaj, pro la malvarmiĝo, la energio iĝis materio kiu kreis galaksiojn kaj stelojn. La galaksioj pli kaj pli malproksimiĝis kaj ankoraŭ nuntempe malproksimiĝas.

Laŭ kelkaj astronomoj la universo entendiĝos eterne, laŭ aliaj, post etendiĝo alvenos maldilatiĝo.

En la jaro 1925, la usona astronomo HUBBLE pensis trovi pruvon de la forfuĝo de la galaksioj. Analizante la lumon ricevitan de galaksioj, li rimarkis ke la spektro estis delokigita al la ruĝa parto, kaj despli delokigita ke la galaksioj estas malproksimaj. Li tuj pensis pri DOPPLER efekto (la Doppler efekto malpligrandigas la frekvencon ricevitan de objekto kiu malproksimiĝas).

Sed en la sesdekaj jaroj oni malkovris strangajn objektojn kies delokigo estas grandega. Laŭ la teorio ili devas esti treege malproksimaj. Sed oni ricevas de ili pli da energio ol ni ricevas de la proksimaj galaksioj. Do, aŭ la teorio pravas kaj tiuj objektoj kapablas elsendi grandegan kvanton da energio, oni tute ne scias kiamaniere, aŭ la delokigo al la ruĝa havas alian devenon ol la

Doppler efekto kaj tiuj objektoj estas proksimaj kaj elsendas normalan energion.

Oni ankaŭ trovis kelkajn galaksiojn proksimajn unu de la alia kaj kiuj havas malsamajn delokigon, do tio ne sekvas la regulon de la teorio de la etendiĝo.

Tamen pasintan jaron, du fizikistoj ricevis la Nobelpremion por la malkovro de kio povas esti la restaĵo de la « Granda Eksplodo ».

Kiu pravas ?

Laŭ la nunaj konoj, oni ne povas elekti inter la tre diversaj teorioj pri la evoluo de la universo.

Eble, post dekoj da jaroj, ni scios iom pli ?

A. MASCLET.

Grésillon malfermita ĝis de 10a de Septembro

Okaze de la renkonto de la Blindaj Esperantistoj
(27a de Aŭgusto - 10a de Septembro)

La Kulturdomo, estos malfermita por ĉiuj kiuj deziros ripozi aŭ ĉeesti ĝis la 10a de Septembro.

Informiĝu : Esperanto-Domo Grésillon, 49150 Baugé.

RIRI

Stranga evento okazis en unu vilaĝo de nia regiono. La leteroj, kiuj foriris el tiu vilaĝo alvenis al la ricevontoj kun plia bileto ofte tre amuza. Jen kelkaj ekzemploj : tiu ĉi akompanis leteron de edziĝinta virino al sia amanto : « Sinjorino, bone estus, ke mi tiru al vi la orelojn ! » (Riri). La dua, en priafera letero, esprimis severan juĝon : « ĉu ci ne hontas, dika porko, preni 60 % ? » (Riri). La tria respondis al farmisto, kiu riproĉis la veterinaron pri malbona flegado al lia bovino : « Ci estas sufiĉe riĉa, ke ĝi mortu cia bovino ! » (Riri). La kvara substrekis la subskribon de junulo, kiu indikis rendevuon al sia fianĉino, malantaŭ la preĝejo ; « Kaj se ankaŭ mi ĉeestus la rendevuon ? » (Riri).

La plej ofte tiuj biletoj estis ĝentilaj ; tamen, iufoje, ĝi montriĝis multe pli aĉa : ĝi akompanis leteron de viro edziĝinta al juna metiistino, kiun li senĉese turmentis : ĉi estas aĉulo ! » (Riri). Estis ankaŭ minacoj ; « se ci ankoraŭ vendas cian lakton tiel koste, mi iros dum la nokto cin tiri per la piedoj » (Riri).

Dum du monatoj la leteroj alvenis kun 24-hora malfruo al la ricevontoj. Riri ne kompletigis ĉiujn leterojn ; li preferis la am-leterojn ; kio klarigas, ke oni tiel longe atendis antaŭ ol plendi al la ĝendarmoj.

Oni do diskrete enketis.

En la poŝtoficejo la poŝtestrino estis 39-jara, fraŭlina kaj deĵoris en tiu vilaĝo de 13 jaroj. La leterportisto estis 58-jara kaj patro de ok infanoj ; li estis ĵus ricevinta la medalon por sia 30-jara bona servado. Totoro, 15-jarulo, portis la telegramojn ; lia nura kliento estis la kastelmastro, kiu ricevis 2-3 telegramojn ĉiutage.

Estas nur unu leterskatolo ; ĝi estas ekstere de la poŝtoficejo, ĉe ĝia muro. Oni neniam rimarkis postsignojn sur la leteroj kaj la kovertoj ; ili alvenis en perfekta stato.

En la poŝtoficejo la leteroj estas enigitaj en plumbosigelitan sakon, kiun la aŭtobuso transportas kun la vojaĝantoj al la proksima stacidomo. Dum unu semajno la kampogardisto akompanis la sakon ĝis la trajno. Tamen estis ankoraŭ biletoj de Riri en kelkaj leteroj.

Tiuj biletoj estis skribitaj per literoj elprenitaj en la du ĵurnaloj, kiuj alvenas al la vilaĝo. Neniam oni trovis malkorektaĵojn. Ne, la poŝtoficistino ne havis amanton. La leterportisto ne havis tempon, li havas grandan ĝardenon por nutri siajn 8 infanojn. Totoro kaj liaj gepatroj ne bone konas la gramatikon. La kastelmastro neniam venas en la vilaĝon ; estas lia sekretario, kiu alportas la leterojn kaj ĉiam, li ilin donas al la giĉeto. Dekstre de la poŝtoficejo estas granda ĝardeno, maldekstre estas nekulturita kampo. Kontraŭe estas la domo de S-ro Simeono kaj de lia fratino. Longtempe li estris spicejon en la najbara urbo. Li estas ankoraŭ la proprietulo kaj daŭrigas interesiĝi pri tiu magazeno. Li tre ofte skribas, du-tri-foje potage, al sia domano. Ankaŭ li ricevis biletojn de Riri. Li tre ofte tedas la poŝtoficistinon : por aĉeti poŝtmarkon, por pesi presaĵon, por registri leteron.

Jen do kio okazis :

Riri estis instalinta « dentostangon » ; estis ferpeco, kiun li duone faldis ; ĝi pendis ĉe du ferfadenoj ; Riri enŝovis la dentostangon en la leterskatolon kaj ĝin fiksis per du etaj hokoj.

La leteroj falis sur la ferpecon ; de tempo al tempo, Riri portis leteron en la leterskatolon kaj lertece tiris la aliajn leterojn Hejme li enigis dikan ferfadenon fendita ĝis la 2/3 ; li glitigis ĝin en la koverton, kaptis la leteron en la fendo, volvis ĝin ĉirkaŭ la ferfadeno, tiris la tuton, legis la leteron, aldonis bileton kaj invers-maniere remetis la tuton en la koverton. Pacienca kaj delikata okupado !

Kiu estis Riri ? Ja, S-ro Simeono, kiu de sia fenestro, observis siajn viktimojn, portis siajn proprajn leterojn al la leterskatolo kaj same lertece eltiris la aliajn leterojn.

Liaj emeritaj tagoj estis plene okupitaj. Li ne havis tempon por enui !

Raporto pri la Internacia Printempa Semajno 79 en Grésillon, de la 11-a ĝis la 18-a de aprilo

Organizite de la Esperantista Kulturdomo kaj de la Franca sekcio de ILEI, jam de la jaro 1975, la Internacia Printempa Semajno bone meritis sian nomon ĉijare, ĉar partoprenis pluraj grupoj kun sia gvidanto. Venis 4 geknaboj el Hvidovre (Danlando) kun Lis Thune, 8 knabinoj el Wormer (Nederlando) kun Pim van Tol, 3 gelernantoj el Le Mans kun J. Bénistant, 17 gelernantoj el Hennebont kun Frédéric Le Magadure. Aldoniĝis germana knabo kaj kelkaj aliaj junaj Francoj akompanataj de siaj gepatroj. Entute ariĝis 40 infanoj kaj gejunuloj.

Matene, ĉiu, laŭ sia nivelo, sekvis unu el la tri kursoj gviditaj de Lis Thune, Pim van Tol kaj Frédéric Le Magadure. Ankaŭ plenkreskuloj partoprenis ilin.

Posttagmeze, la vasta parko de Grésillon ebligis multajn ludojn kaj promenadojn, kolektadon de primoloj kaj aliaj floroj por ornami la tablojn de la manĝoĉambroj aŭ la dormoĉambroj. Unu posttagmezo estis dediĉita al la vizito de la urbo Tours, riĉa je vidindaĵoj : la katedralo, la rivero Loire, la malnovaj kvartaloj bele renovigitaj, la muzeo de la metifrateco... Ĉio okazis sub la lerta gvidado de Tours-ano, Paul Poisson. Ankaŭ la veturado estis tre agrabla kaj gaja, ĉar la infanoj sin sekvis ĉe la mikrofono por kanti en Esperanto aŭ en sia nacia lingvo. Inter la promenadoj, ni menciu ankaŭ la viziton al la dolmeno kaj tiun al la bestfoiro en Baugé.

Dum la vesperkunvenoj ĉiuj plezure kantis, la ĉeestantoj konatiĝis kun la loĝlokoj de la grupoj, dank'al lumbildoj komentitaj de la koncerna gvidanto. La programo de la lasta « ĝenerala » vesperkunveno (antaŭ la foriro de la Danoj) estis riĉa kaj diversa : sin sekvis kantoj, skeĉoj, lumbildoj desegnitaj kaj komentitaj de la infanoj mem. Dum la preparado de tiu lasta serio, la eksterlandaj instruistoj lernis la teknikon pri lumbilddesegnado. Multe plaĉis la prezentado de diapozitivoj nigrablankaj, kiuj revivigis bonegajn epizodojn de la ĵuspasintaj tagoj. Ni ŝuldas tion al la staĝfotistoj, Henriko kaj Yannick, kiuj unuafoje provis tiun rimedon, unuafoje kaj sukcese. Aliaj staĝanoj helpis ilin en la rivelado kaj tondado de la bildoj.

La infanoj sin okupis ankaŭ pri la multobligado de tekstoj kaj desegnoj por la staĝĵurnalo, donacita al ĉiu partoprenanto en la lasta vespero, kaj en la farado de krokodiloj aŭ kolieroj el perloj...

La etoso dum tiu restado havis familian karakteron, ĉio glate disvolviĝis dank'al la bonaj rilatoj inter ĉiuj. Konklude, la Internacia Printempa Semajno tre bone sukcesis kaj ni diras nur « ĝis revido ! »

J. Bénistant kaj F. Le Magadure.


La plenkreskaj partoprenantoj de la Paska Periodo havis unikan okazon pristudi la pedagogion de la lingvoinstruado al infanoj laŭ la jena skemo : ĉiumatene, ili vizitis laŭvice unu el la kursoj. Posttagmeze, ili kunvenis por prezenti siajn rimarkojn pri la instrumaniero de la respektiva gvidanto. Sekvis debato sub gvidado de S-ino Vincent. Fine de la restado, la seminarianoj ĸlopodis eltiri kelkajn konkludojn kaj gvidprincipojn por Esperanto-instruado al infanoj :

— plene uzi la aktivemon de la infanoj, invitante ilin desegni, kanti, gesti ,mimiki, iri al la tabulo (ili aparte ŝatas tion) ;

— uzi ankaŭ ilian kreivemon per manlaboraĵoj, ĉiuj aktivaĵoj celante al akiro de sufiĉa vort — kaj fraz — provizo por kiel eble plej kompleta esprimkapablo.

Facile konkludiĝas, ke oni instruu laŭ rekta metodo, ĉefe kiam infanaro estas diversnacia, kiel ĝuste okazis en Grésillon.

J. Vincent.



INSULAE FORTUNAE

(LA FORTUNAJ INSULOJ — LA KANARIAJ INSULOJ)

La Kanariaj Insuloj, ekstrema bastiono de Atlantiso, unu el la lastaj restaĵoj de tiu kontinento sinkinta antaŭ proksimume 20 000 jaroj en la Atlantikan Oceanon, ĉiam perpleksigis scienculojn kaj historiistojn. Multaj legendoj kreiĝis pri ĝi. Nur antaŭ relative mallonga tempo seriozaj studoj kaj esploroj estis faritaj sur la teritorio de la insuloj mem, en ŝtataj arĥivoj, privataj kolektoj, muzeoj, kaj bibliotekoj de Eŭropo, Afriko, kaj Mez-Oriento. Ili ebligis restarigi pasiigan historion eble pli fantasta ol la legendoj mem. Tiu konciza eseo celas skizi la grandajn liniojn de tiu historio, unika en la tutmondaj analoj.

LA ANTIKVAJ TEMPOJ

Ne dubeble, jam plurajn jarmilojn antaŭ la Kristana erao la Kanariaj Insuloj estis konataj de la Egiptoj. Pro diversaj ĵusaj arkeologiaj eltrovoj pli kaj pli konfirmiĝas, ke longatempe antaŭ la dinastiaj epokoj estis rifuĝintaj eskapintoj el la kataklismo, kiu enprofundigis en la maron la Atlantisan kontinenton. Cetere ni povas tute logike pensi, ke kelkaj el tiuj rifuĝintoj delasis sian naskiĝan landon antaŭ ties neniigo ; ĉar iliaj scienculoj povis antaŭvidi ĝin.

La Grekoj konsideris la sepinsulan arkipelagon kiel la mirindan « Ĝardenon de la Hesperidinoj », kie vivis la sep filinoj de reĝo Hespero. Tiu reĝo estis filo de la giganto Atlaso, kiu surportis la teron sur siaj ŝultroj. Ĉu eble lia nomo ne estis donita al la fabela Atlantiso ?

La Romianoj heredintoj de la Greka mitologio kromnomis la insularon « Insulae Fortunae », la « Fortunaj Insuloj ». Ili estis famigitaj « neatingeblaj » pro sia izola situo en tropika regiono, malproksima de la Afrika marbordo je cent kilometroj, trans la ne trapaseblaj Kolonoj de Herkulo (la markolo de Gibraltaro).

LA MEZEPOKO

Dum la tuta Mezepoko, la Kanarioj estis forgesitaj, kaj metitaj samrange kiel la mitologiaj Grekaj kaj Romiaj fabloj. Tamen en Normandaj, Hispanaj, kaj Portugalaj havenoj maristoj rakontis strangajn historiojn pri foraj insuloj protektitaj de drakoj kaj fantastaj monstroj.

Tiuj maristoj estis trampintaj laŭlonge de la Afrika marbordo preskaŭ ĝis la Ekvatoro, sed ĉiam prigardante vidon al la tero. Ili ekvidis tiujn misterajn insulojn, kiam iliaj ŝipoj pelitaj de tempesto estis en danĝero perdiĝi en la altan maron.

Eĉ, oni diris poste, ke Kristoforo Kolombo uzis ilin kiel lastan haltejon antaŭ ol alfronti la vastegan, ŝajne senliman Oceanon.

LA FRANCA KONKERO

La konata historio de la Kanariaj Insuloj komenciĝas kun la naskiĝanta 15a jarcento. La lan de Majo 1402, velŝipo albordiĝis al golfeto de Lanzaroto, la pli Norda insulo de la arkipelago. La ekspedicio konsistis el 53 viroj, maristoj, dungosoldatoj, kaj du aŭ tri monaĥoj. Ĝi estis komandita de Normanda nobelo, Johano de Béthencourt (pr : betenkur') naskinĝinta en sia feŭdo Grainville-la-Tainturière (pr. : grinvil' la tinturjer'). Li estis helpata de alia Normanda nobelo Gadifer de la Salle (pr. : gadifer' de la Sal').

Tiu ŝipo ne estis la unua fremda ŝipo albordiĝanta la Kanarian grundon. De jam longa tempo, Barbareskaj piratoj (t.e. Arabaj, Turkaj, aŭ Nordafrikaj) kaj Eŭropaj kaperistoj tien venis por pli-malpli sukcesaj raboj, ĉiam nedaŭraj. Tial la alvenantoj estis malfide akceptitaj. La insulanoj, la Gŭanĉoj altiris ilin al danĝeraj embuskoj aŭ kaptiloj. Tamen, la franca Trupeto sukcesis alveni ĝis la montara centro de la insulo piede de la impresiga fortreso, kie reĝis la reĝo de la insulo, Gŭardafio. Li tre facile povintus ekstermi la malgrandan trupon. Sed, fidela je la Gŭanĉa etiko, kies unuaj bonoj estas paco kaj libero, Gŭadarfio decidiĝis diskuti kun la fremduloj antaŭ ol ekbatali.

Kredeble, la Franca Kavaliro estis elokventa kaj persvada, ĉar li ricevis konvertiĝon de la reĝo al la Kristana religio, kaj permeson instaliĝi en la insulo.

La Gŭanĉoj, homoj el la blanka raso, alte staturaj ĝenerale ĝis 1 metro kaj 80 centimetroj, eĉ ĝis du metroj posedis reale herkulan forton, kaj akrobatan lertan movecon. Ili havis longajn nigrajn harojn kaj bluajn okulojn. Ili estis vestitaj de netanitaj feloj, kaj de felaj altaj kapvestoj ornamitaj de grandaj plumoj. Ilia aspekto estis timiga, sed mildigita de lojala kaj sentrompa fizionomio.

Tamen ŝajne ilia evoluo haltis je la ŝtona epoko. Ili ignoris la uzadon de la metaloj — kiuj verdire estis praktike neekzistantaj en tiu vulkana grundo konsistanta preskaŭ nur el malvarmiĝinta lafo. La armiloj kaj laboriloj de la insulanoj estis faritaj el diorito, tre abunda, kaj el speco de nigreca lafo, kies eĝoj estas tiel tranĉaj kiel la plej bona ŝtalo. Krome la ŝtonoj kaj rokosplitoj surŝutantaj la grundon facile fariĝis danĝeraj ĵetaĵoj pro sia pezo kaj la nekredebla forto de la uzantoj.

Agrikulturo tre primitiva estis paktikebla nur funde de profundaj kaj mallarĝaj valoj. La metiistoj produktis belajn glazuritajn potaĵojn kuiritajn en fornoj, elegantaj kaj ornamitaj de geometraj desegnoj. La korbaĵoj kaj teksaĵoj montris veran artemon. Kurioza afero : tiuj insulanoj havis nenian nocion pri navigado ; ili havis nek kanotojn, nek pirogojn, kaj eĉ ŝajnis timi akvon.

Iliaj moroj estis mildaj kaj kuriozaj. Ili baziĝis sur tre solidan fundamenton de veramo kaj nepra lojaleco, kaj potenca amo al paco kaj malŝato de vanaj kvereloj. Ili estis monogamoj, kaj la familia sento estis la neŝancelebla bazo de ilia sociala vivo. Ili loĝis en grotoj naturaj aŭ vastigitaj per ŝtonaj laboriloj. Ili havis grandan respekton al la mortintoj, kaj eĉ konis la arton de mumiigo.

Ilia religio, dirita idolana, kredis pri la ekzisto de kelkaj dioj aŭ ĉielaj potencoj dependantaj de la unika Dio superega, Alkoran, kreinto kaj konservanto de la universo. La ceremonia kultado konsistis el oferoj de bestetoj, de agrikulturaj kaj metiistaj produktaĵoj, oferitaj al la Dio Alkoran. Ŝajne tiu religio estis degenerita esprimo de antikva monoteista kulto al kiu aldoniĝis pli-malpli maldelikataj superstiĉoj. Pri tio, niaj modernaj religioj ja povus neniel envii tiun de la Gŭanĉoj. Fakte, tiu kunekzistado de la plej noblaj homaj sentimentoj kun tiel eksteror-

dinara prahistoria vivmodo pensigas, ke tiuj homoj originis el tre progresinta civilizo (tiu de Atlantiso), el kiu ili estis brutale disigitaj de terura kataklismo.

La interrilatoj inter Francoj kaj Gŭanĉoj rapide fariĝis tre bonaj, ĉiu skrupule observanta la klaŭzojn de la amika pakto. Johano de Bethencourt per politiko saĝa, justa, kaj senpartia, grandanima kaj bonvolema konkeris la amon de siaj regatoj. Li instruis plibonigajn teknikojn al la metiistoj kaj kultivistoj, instalis irigacian sistemon, kaj lernigis la konstruarton. Li starigis veran urbon « laŭ la franca modo ».

Poste, la Franca Kavaliro sin turnis al la aliaj insuloj, Fuerventuro, Gomero, kaj Hierro. Facilaj konkeroj, ĉar la invadantoj estis akceptitaj kun ĝojego. Nur Hierro, kulpe de kelkaj soldatoj, kaŭzis kelkajn nedaŭrajn malfacilaĵojn. Johano de Béthencourt establis en tiuj insuloj la saman specon de protektorato, kiel en Lanzaroto.

Johano de Béthencourt sentante, ke li maljuniĝas decidiĝis reiri al sia naskiĝa patrolando. Li revenis en sia kastelo de Grainville-la-Tainturière. Tie li mortis en 1425, aĝa proksimume je 65 jaroj. Li estis enterigita en la paroĥa preĝejo.

Post le foriro de Jean de Béthencourt, lia nevo Mériot (pr. : merjo') de Béthencourt, do estris la kolonion konsistantan el kvar el la Kanariaj Insuloj. La tri pli grandaj, Granda Kanario, Palmao, kaj Tenerifo restis sendependaj. Mériot edzinigis la filinon de reĝo Gŭadarfino, nomita Tegŭisa. Helpata de la episkopo hispana las Casas, (pr. : las kasas) nomumita de la papo post vojaĝo de Johano al Romo, li daŭrigis la saĝan kaj liberalan administradon de sia onklo. Rezultis rapida prospereco, kiu postlasis profundan memoron ankoraŭ daŭrantan. Pri tiu temo, ni citas kelkajn liniojn de kanoniko Viera y Clavijo, (pr. : vjera i Klaviho) hispana monaho, historiisto de Kanarioj verkinta post la Hispana konkero :

« Laŭ kiu ajn vidpunkto oni konsideras Johanon de Béthencourt, li aperas granda ? Lia prudento, lia kuraĝo, lia afableco, lia nobeleco, kaj eĉ lia patrio ŝajnas konverĝi por glorigi lin. Al vireca fizionomio, altaj pensoj, al firma kaj rezoluta koro, al milda kaj tolerema spirito, li aldonis guston pri heroa Kavalireco »...

Kompreneble, la prospereco de la Franca kolonio, kaj la ekzisto de la tri aliaj sendependaj insuloj de la arkipelago naskis multajn avidojn. La provoj por albordiĝoj far piratoj kaj kaperistoj ĉiunaciaj, kaj aventuristoj eĉ kelkafoje diskrete helpitaj de la Hispana kaj Portugala registaroj estis multaj. Sed ili ĉiam estis forpuŝitaj de la Gŭanĉoj forte organizitaj kaj disciplinitaj.

LA HISPANA KONKERO

La morto de Johano de Béthencourt kaj de episkopo las Cazas signas la komenciĝon de longa periodo de luktadoj fine kaŭzinta la pereon de la « Fortunaj Insuloj » kaj de la Gŭanĉa popolo ekstermita de la konkerantoj. Marciot de Béthencourt, laŭ la ekzemplo de sia onklo decidiĝis forlasi la kolonion. Subskribinte akton de cedo de siaj rajtoj al la Portugala reĝlando, li retiriĝis en la Portugala insulo Madero, kie finiĝis lia vivo. Tiu cedo kaŭzis longan rivalecon inter la du Hispanaj landoj. Efektive, ĉar la Papo nomumis la Hispanon Las Cazas episkopo de la konkeritaj insuloj (alia Hispana episkopo anstataŭis lin post lia morto), la spirita regado de la kolonio de Johano de Béthencourt estis Hispana. Kaj ĉar, la episkopoj ankaŭ efektive partoprenis la administradon, la kastiliaj gereĝoj pretendis posedi superajn rajtojn.

Multfoje, Hispanoj kaj Portugaloj malsukcesi provojn por konkeri la arkipelagon, spite la superecon de siaj armiloj, uzon de la tutĵusaj fajroarmiloj, kaj de « militruzoj » pli-malpli honestaj. Fine, la du fremdaj registaroj, laciĝintaj pro siaj multekostaj malsukcesoj decidis kunigi siajn strebadojn. En 1467, ili subskribis akordon por granda ofensivo. La fiasko estis kompleta, kaj la kunakordo ne plu daŭris. Sed la Kastiliaj gereĝoj obstinis. Fine en 1483, Granda Kanario estis konkerita. Same en 1495, Palmao kaj Tenerifo malvenkiĝis pro la hispana premado. Tiel finiĝis la konkero de la arkipelago.

Malgraŭ solenaj promesoj kaj ĵuroj (oni eĉ ĵuris super nekonsekrita hostio por ne fari sakrilegion, tamen trompante la Kanarianojn), la indiĝenaj gentoj estis torturitaj kaj masakritaj, viroj, virinoj, kaj infanoj. La Gŭanĉaj reĝoj kaj estroj, kaj granda nombro de la pli fortikaj viroj kaj virinoj estis venditaj sur la skalvovendejoj. Tiel la « Katolikaj » Gereĝoj de Kastilio finis kaj firmigis sian posedon de la Kanariaj Insuloj. Necesis ĉirkaŭ 70 jaroj por finvenki la rezistadon de la Gŭanĉoj per malhumanaj militoj. Tiu genocido plenuminta la konkeron estis preskaŭ nekonata en Eŭropo.

Tamen, unu moderna scienciulo, Attilio Gaudo trovis en manuskripto skribita inter 1527 kaj 1559 — kiu neniam estis tute publikita — kaj estas konservata en la Akademio de Historio en Madrido, indignan kaj severan juĝon, el kiu ni donas kelkajn liniojn ĉisube. La aŭtoro estis hispana monaho, Fra (frato) Bartolemo de Las Casas.

« ...Nu kiel ! ili alportis militon kaj sklavecon ; ili kiuj sin deklaris anoj de la leĝo de Kristo ! Ĉu tio estis surpaŝi la spurojn de ilia dia Majstro ? Ili, kiuj pretendis allogiĝi al Kristo pro amo, boneco, mildeco, kaj pro lia ekzemplo pri ĉiuj virtoj ; ĉu tio estis fari al aliaj homoj la bonon deziratan al ili ? Ĉu tio estis edifi la homan rason ?... ».

Tial malaperis tiuj idoj de la Atlantisanoj, viktimoj de la senskrupula avideco de homoj sin pretendantaj « civilizitaj ». Tre malmultaj estis la eskapintoj rifuĝintaj en la profundaj grotoj de siaj montoj. Eĉ monto Piko, tiu «alta loko », amata kultloko de la Atlantisanoj estas nur vulkano, en kies interno ankoraŭ muĝas subtera fajro.

Pro neceso la kelkaj eskapintoj, fine fandiĝis kun la novaj kolonianoj. Tial, ankoraŭfoje troviĝas iu ido de la bela Gŭanĉa raso, ĉe kiu la misteraj heredaj leĝoj renaskis karakterizajn ecojn de la prapatroj.

NUNTEMPE

Post preskaŭ duone miljara evoluado la Kanariaj Insuloj atingis rimarkindan elvolviĝon. Multaj enmigrintoj — ĉefe Hispanoj — alportis novan sangon. La « Insulae Fortunae » refariĝis indaj pri sia antikva nomo, « la Fortunaj Insuloj ». Agrikulturo kaj industrio konsiderinde progresadis. Agema, laborema, progresema loĝantaro estas la novaj Kanarianoj. La modernaj komunikiloj naskis prosperan turisman industrion. Kvankam situantaj en la tropika zono la arkipelago ĝuas tre mildan klimaton pro sia izoleco meze de la Oceano. La unikaj pejzaĝoj, ofte ĥaosaj pro sia vulkana origino, alternas kun riĉaj kultivaj kampoj kaj pinarbaroj, aŭ fruktoĝardenoj. Akceptema popolo, ĉio kontribuas por fari el la insuloj ideala feria restadejo. La mistero vualanta la originon de tiu lando pliigas ĝian allogan ĉarmon, elvokante malnovajn kaj svagajn rememorojn el nia kolektiva subkonscio.

Eloi MOTILLON.

Fotografado - Fotografajo - Fotografio

Dua parto : **La bona uzo de la diafragmo.**

En ĉiuj fotaparatoj estas diafragmo. En tute simpla fotilo, ankaŭ la diafragmo estas tute simpla, sed en la bonaj fotiloj, la diafragmo estas kompleta kaj malsimpla.

Por foti, vi bezonas vian fotaparaton, certe, sed ankaŭ filmon. Ĉiuj filmoj « havas » sentiveco. La sentiveco de la filmo ebligas komparon kun skatoleto, kiun vi devas plenigi per akvo. Por tion fari, estas du eblecoj : vi povas havi grandan truon en la skatoleto, kaj verŝi akvon dum mallonga tempo (granda « rapido » de la fotilo), aŭ ŝanĝi la diametron de la truo ; se la truo fariĝas pli malgranda, la tempo por plenigi la skatoleton grandiĝas ; se la truo grandiĝas, la tempo por plenigi malgrandiĝas (malgranda « rapido » de la fotilo). La diafragmo de la aparato estas la truo de la skatoleto ; do, per la diafragmo kaj la « rapidoj » de la fotilo, vi povas kontroli la kvanton da lumo, kiu eniras por « bombardi » vian filmon, kaj tiel ĝin korekte eksponi. Bone ! Sed la diafragmo aŭ, pli korekte, la diametro de la truo ŝanĝiĝas : oni devas scii kiel kaj kiom grande.

Ĝenerale, la diafragmo estas en la objektivo de la fotilo. Pli ekzakte, inter la lensoj. La optikistoj donis nombrojn por signi la surfacon de la truo, tra kiu eniras la lumo. Tiuj nombroj estas :

1 - 1,4 - 2 - 2,8 - 4 - 5,6 - 8 - 11 - 16 - 22 - 32 - 45 - 64 - 90...

La plej **malgranda nombro** montras la plej **grandan truon,** la plej **granda nombro** montras la plej **malgrandan truon.**

Tra la plej granda truo (1), multe da lumo eniras en la objektivon; tra la plej malgranda truo (90), tre malmute da lumo eniras en ĝin.

Kiam oni transiras de **malgranda nombro** al **sekvanta pli granda nombro,** la **surfaco** de la truo **malgrandiĝas dufoje** (TRUO = DIAFRAGMO).

Ekzemple, de 2,8 al 4, la surfaco malgrandiĝas dufoje ;

de 2,8 al 5,6, la surfaco malgrandiĝas kvarfoje ;

de 2,8 al 16, la surfaco malgrandiĝas tridek-dufoje.

Do, se la **surfaco de la diafragmo malgrandiĝas du- aŭ tridek-dufoje,** la **kvanto da lumo,** kiu eniras la objektivon, ankaŭ **malgrandiĝos du aŭ tridek dufoje,** kaj inverse.

La uzo de la diafragmo ankaŭ donas ion alian : la KAMPAN PROFUNDON. Tiu nocio tre gravas por fari fotografion.

La kampa profundo dependas de tri punktoj :

1° : la distanco inter la subjekto kaj la fotaparato,

2° : la uzita diafragmo,

3° : la fokusa distanco de la objektivo, skribita en milimetroj sur la antaŭa parto de la objektivo.

Praktike, se vi deziras montri nur la subjekton, en via bildo, uzu malgrandan kampan profundon. Do, fotu vian subjekton de tre proksime aŭ uzu teleobjektivon (objektivo kun granda fokusa distanco), aŭ ankoraŭ, fotu kun malfermita diafragmo.

Male, se vi bezonas grandan kampan profundon, uzu tute fermitan diafragmon, fotu de tre malproksime, aŭ uzu grandangulan objektivon (objektivo kun malgranda fokusa distanco).

Fakte, se la **distanco** inter la subjekto kaj la fotilo estas **granda,** la **kampa profundo** estas **granda,** kaj inverse. Se la **diafragmo** estas tre **« fermita »,** la **kampa profundo** estas **granda,** kaj inverse.

Se la **fokusa distanco** de la objektivo estas **malgranda,** la **kampa profundo** estas **granda.**

Bone laboru, ĉiuj fotografantoj !!

W. GRELA.

Noto (de la reskribinto). — « kampa profundo » : Regiono, en kiu ĉiuj objektoj formas sufiĉe netan bildon sur la fokusa ebeno, respondata al la distanco, por kiu oni enfokusigis » (PIV), aŭ alidirite : regiono, en kiu ĉiuj objektoj donas netan bildon sur la filmo, post kiam oni elektis diafragmo- kaj distancoreguligon.

POR VIA DISTRO

Solvo de la antaŭa problemo

Krucvortoj

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11
1	M	A	L	F	I	R	M	I	G	A	S
2	A	L	I	A	■	E	G	■	E	N	U
3	R	I	P	■	U	F	■	B	R	A	K
4	M	E	■	A	R	E	K	O	■	S	E
5	O	■	A	P	A	R	A	T	O	■	R
6	R	E	G	E	N	E	R	E	B	L	A
7	U	■	U	R	I	N	■	L	I	■	Ĵ
8	M	I	■	■	S	C	I	O	■	D	E
9	I	R	O	■	M	I	L	■	B	O	J
10	T	A	R	D	■	L	■	L	O	T	O
11	A	K	T	I	N	O	L	I	T	O	J

Horizontale :

1) Dunganto.

2) Stilzbirdo — Vir-nomo (R).

3) Admirinda (R) — Iama infanteriano — Nedefinita adjektivo.

4) Gustoplena distinginda virino (R).

5) Aro da kune irantaj homoj aŭ bestoj — Renkonto de kontraŭaj cirkonstancoj.

6) Li posedas ordenpovon (R) — Salomono uzis la libanan por la rekonstruo de la templo en Jerusalemo (R).

7) Movo de rivero en la maron — Mara rabisto (R).

8) Adverbo — Prepozicio — Vintra sporto.

9) Ujo kun kovrilo — Lirika poemo (R).

10) Konjunkcio — Agrabla kaj subtila odoro.

11) Posesiva adjektivo — La flava estas kontaĝa malsano de mediteraneaj landoj (R) — Nombro.

12) Ĝi estas radiografio.

NOVA PROBLEMO

KRUCVORTOJ (proponitaj de R. Raynaud)

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
I												
II						■						
III				■						■		
IV												■
V					■							
VI		■	■					■				
VII							■					
VIII			■			■						
IX								■		■		
X		■			■						■	
XI				■					■			
XII											■	

Vertikale :

1) Li ne frekventas preĝejojn (R).

2) Utila insekto — Konjunkcio — Pronomo.

3) Senkoverta kunfaldita letero (R) — Pomkrakmanĝinto (R).

4) Verba finaĵo — Malpeza velŝipo.

5) Helruĝeta — Astro — En fungo.

6) Sanktoleo — Inverse : efetive ekzistanta (R).

7) Elokventa publika parolanto (R) — Tia ke ĝi entiras likvaĵon.

8) Novico (R) — En spiko — Ne ĉiuj diris karotarulo havas la bonŝancon esti tio (R).

9) Doktrino de la Usonanoj favore al la negroj (R).

10) Adverbo — Rilate al franca rivero — Lirika poemo.

11) La plej vasta el la britaj Antiloj.

12) Participa adjektiva finaĵo — Konforma al la tradicia doktrino (R).

GRAMATIKO PER BONHUMORO

STATŜANĜO

Akuzativo N servas por montri statŝanĝon :

— tiu ideo metis lin en bonan humoron.

Ŝanĝi : la feino ŝanĝis la citrolon en kaleŝon

— ili ŝanĝis la maron en polderojn.

Formiĝi - aliformigi - transformi :

— sub viaj fingroj la argilo formiĝis en vazon - la tonoj de la diskantulo transformiĝis en najtingalon — tro volonte ŝi sian duanfilinon aliformigus en sovaĝan cignon - la nokta mallumo maltrankvilecon aliformigas en timegon.

Metamorfozi : la larvo metamorfoziĝos en plenkreskan beston.






Agrabla solvo :


Tute trankvile frandu tiujn ĉokoladojn - ili estas farĉitaj je tablojdoj maldikigaj. Pli kaj pli da ili vi manĝos, pli kaj pli ili aliformigos vin en sveltulinon.



Povra karulo :

Estas via mastro, kiu informiĝas pri vi. Li volas scii, ĉu la hodiaŭ-matena nova kaĉo transformis vin en ĝojan hundeton.





Ĉu fiasko ?

Ni esperas, ke nia polic-filmo plaĉis al vi ; ke la okulfrapaj eventoj ŝanĝis vin en aŭdacajn kaj subtilajn detektivojn.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (160 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (240 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (4,80 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (50 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (35 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (18 mk.).

Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 42-10° - D ALICANTE (650 pes.).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (10 us. dol.).

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Alfieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (7000 liroj).

Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (1 800 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (10 U.S. dol.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL. ZH pĉk 209721 (20 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN (40 kr.).

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima) (10 us. dol.).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (10 us. dol.).

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (35 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (20 fr.).

Usono : S-ro R. Kent Jones, 452 Aldine, Apt. 501 - CHICAGO, Illinois 60 657 (10 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 10 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 2 de 1979, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Le compte rendu de l'Assemblée générale vous apporte des informations sur la vie de la Maison Culturelle en 1978. Il s'agit en partie d'un rappel de ce que les comptes rendus des réunions du Conseil d'administration avaient pu vous apprendre. Le compte d'exploitation et le bilan ont été explicités.

L'été approche avec peut-être une participation plus importante que l'an dernier. Le nombre actuel des inscriptions le laisse augurer. Bien que de structure identique à celles des années passées, la « saison » verra quelques timides innovations ou plus exactement la mise en œuvre de deux idées : l'élargissement de la notion de pratique de l'espéranto, pratique et acquisition pouvant se faire en dehors d'un cadre scolaire, autour d'une activité choisie ; la mise en place d'une animation qui ne concernera pas les seules soirées. J'ai parlé d'innovations « timides », car nous ne pourrons juger de la forme à donner que progressivement, sur le tas. Il ne s'agit pas d'innovations limitées a priori, mais dont les résultats partiels, au long des jours, en détermineront l'ampleur et la répercussion sur les années à venir. Les participants seront juges et partie puisqu'ils auront leur part dans les résultats et leur mot à dire dans l'expérience elle-même.

Quelques travaux auront pu être réalisés pour l'été : insonorisation de la nouvelle salle de cours, revêtement des murs de l'escalier conduisant au deuxième étage, peinture et tapisserie des toilettes. Nous avons dû limiter nos ambitions dans ce domaine d'autant plus que le remboursement d'une certaine quantité de parts aux héritiers de sociétaires décédés et à des sociétaires momentanément en difficulté a encore diminué nos possibilités. A ce sujet, vous qui le pouvez, pourquoi ne deviendriez-vous pas sociétaire ? Pourquoi ne prendriez-vous pas quelques nouvelles parts ?

P. BABIN.

INTER NI

Okaze de la Ĝenerala Asembleo estis donitaj informoj pri la financoj kaj pri la funkciado de la Domo dum la antaŭa jaro. Nun ni devas pensi pri la venonta somero, kiu, laŭ vidpunkto de partopreno, anonciĝas favora. Ni jam parolis pri kelkaj ŝanĝoj en la programo ne koncerne la strukturon sed koncerne la enhavon. Ni provos praktikigi la lingvon po grupoj, laŭ specialaj interesoj, sed ankaŭ praktike, ekster la kutima sistemo de la kursoj. Ĉu ni sukcesos ? Tio dependas ankaŭ de la ĉeestantoj.

Ni devis limigi la prizorgajn aŭ modernigajn laborojn pro tio ke la financa rezulto de la antaŭa jaro ne ebligis fari pli kaj ankaŭ pro tio ke kelkaj membroj petis, pro diversaj personaj kialoj, repagon de akcioj. Ni rememorigas, ke estas eble, eĉ nun, aĉeti akciojn, kio permesos kompensi la repagojn. Vi povas peti informojn se necese.

FONDUSO FOTOKOPIILO

2-a listo

antaŭa listo :	482
S-ino TURIN	200
S-ino TABEL	100
S-ro SCHUTT	100
Anonyme	1000
F-ino BENOIT	100
S-ro MICHAUD	25
S-ro GUILLOU	50
Sume	2059

NOS JOIES

Florent, Eve-Line, Pierre-Etienne et Alice Mathé nous ont annoncé l'arrivée dans leur famille de Joo Yun Claire, née à Séoul. La bienvenue à cette nouvelle grésillonnaise.

Pierre et Françoise Rousseau nous ont fait part de la naissance de leur fille Perrine. Meilleurs vœux à l'enfant et compliments aux parents, ainsi qu'aux grands-parents, M. et Mme Jack-André Rousseau.

NOS PEINES

C'est avec beaucoup de peine que nous avons appris la disparition de Jean-Paul Vilhelm. C'est à la fois un ami qui savait rendre service avec discrétion et compétence et un espérantiste de valeur que nous perdons. Manjo et ses enfants savent toute la douloureuse sympathie que nous éprouvons à leur égard.

Il est toujours possible de devenir

SOCIETAIRE DE LA M.C.E.

Il est toujours possible de prendre des parts de

SOCIETAIRE

Une part coûte 100 F.

A adresser à

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE

C.C.P. Nantes 1485 39 P

☆

Demandez-nous les **STATUTS** de la Maison, si vous ne les avez pas.

Assemblée générale du 30 Avril 1979

L'assemblée générale ordinaire des sociétaires de la Maison Culturelle Espérantiste s'est réunie le 29 avril 1979. Le nombre des présents et représentés étant de 239, le quorum est dépassé et la séance est ouverte à 10 h. 30.

M. Thébaud est élu président de séance.

RAPPORT FINANCIER

En l'absence du trésorier, le rapport financier est présenté par M. Babin, président de la M.C.E.

L'examen du **compte d'exploitation** fait apparaître une diminution du stock à la fin de l'exercice 1978, en raison de la date de remplissage de la cuve de mazout (après la clôture de l'exercice).

Recettes :

Les recettes des séjours sont en baisse, malgré la majoration des tarifs ; en effet, par rapport à 1977, les passages ont été moins nombreux en mai et juin, et la fréquentation a été moins grande pour le premier stage. (Au total, pour la saison, 3.740 passages contre 4.335 en 1977). En compensation, les séjours ont été mieux équilibrés et la gestion moins lourde qu'en 1977.

La diminution des séjours se répercute en général sur les recettes des autres postes, avec pourtant deux exceptions :

— les recettes de librairie sont nettement en hausse (majoration des prix, mais aussi augmentation des quantités vendues) ;

— les inscriptions au cours par correspondance sont aussi plus nombreuses (beaucoup prises à la suite des stages).

Dépenses :

Augmentation importante de l'assurance.

Peu d'augmentation des dépenses d'alimentation : la hausse des prix est couverte par la diminution de la consommation.

Augmentation des dépenses d'électricité (prix du kw/h), des salaires (augmentation du S.M.I.C.), des frais de correspondance (de plus en plus de correspondance par avion avec l'étranger) et de librairie (reconstitution des stocks).

Les frais de bureau sont en diminution par suite des achats faits antérieurement.

Amortissement :

M. Cheverry remarque que l'amortissement est élevé par rapport à l'immobilier restant à amortir (20 %).

M. Babin explique que cet amortissement élevé a été fait pour rattraper le retard pris au moment du remboursement des dettes.

A L'ACTIF

L'**examen du bilan** fait apparaître l'augmentation des immobilisations en 1978 en raison de l'installation de l'eau chaude dans les chambres et de la pose des canalisations en prévision de l'installation de chambres dans les bâtiments annexes.

Ces travaux, ainsi que la diminution des recettes « séjours », expliquent la diminution des disponibilités à la Caisse Nationale d'Epargne.

AU PASSIF

Il faut noter un important remboursement de parts de sociétaires : après décès d'une sociétaire, les parts sont revenues au don à la M.C.E. ; mais il a fallu rembourser 100 parts à un sociétaire qui avait pris cette participation en précisant qu'il pourrait en demander le remboursement pour raisons de santé.

Par ailleurs, 39 parts nouvelles ont été souscrites par de nouveaux sociétaires ou par des anciens ; le nombre de sociétaires est actuellement de 451.

— **Dette à court terme :** les remboursements ont été faits en commençant par les sommes les plus petites, puis les plus importantes ; la dette restante se rapporte à l'installation des cuisinières et au reliquat de l'installation du chauffage.

— **Les dons** ont été en baisse très nette en 1978.

— **Fonds « photocopieur »** : deux espérantistes ont demandé qu'on installe un photocopieur à Grésillon ; cette demande était accompagnée d'un envoi de fonds.

M. Guillot propose qu'on envisage la possibilité d'emprunter ou de louer cet appareil. La question sera étudiée pa rle Conseil d'aministration.

Après discussion du rapport financier, M. Prévost donne lecture du quitus accordé par les commissaires aux comptes.

L'assemblée adopte le rapport financier à l'unanimité.

RAPPORT D'ACTIVITE

Le rapport d'activité est présenté par le président.

M. Babin rappelle que l'équilibre entre les divers stages a été encore meilleur qu'en 1977, ce qui a permis une gestion moins lourde.

Les activités (cours, conférences, travaux manuels) ont été bien suivies. Malheureusement, le nombre de « journées » a été inférieur de 15 % au nombr ede 1977. (Moyenne des présences par jour en 1978 : juillet, 66 ; août, 63 ; septembre, 52).

Les travaux dans les communs ont continué, en vue de l'installation envisagée de salles de cours et de chambres.

Après discussion et échange de vues, le rapport d'activité est adopté à l'unanimité

COMMISSAIRES AUX COMPTES

M. Berthelot ayant demandé le remboursement de ses parts, il ne peut plus être commissaire aux comptes.

L'assemblée générale confirme le mandat de M. Prévost et nomme Mlle Ergoll (sous réserve de son acceptation) en remplacement de M. Berthelot.

QUESTIONS DIVERSES

M. Babin donne quelques renseignements sur la rencontre de Pâques, qui rassemblait des enseignants et de senfants de divers pays (une quarantaine). M. Le Magadure, M. Guillot, M. et Mme Boyer assuraient l'organisation de cette rencontre. Mme Vincent animait les colloques pédagogiques. Les résultats ont été très satisfaisants.

Quelques informations sont enfin données sur les prochaines rencontres : rencontres franco-allemandes des Universités populaires à la Pentecôte (50 à 60 personnes).

Pendant six jours, un groupe de 3e âge de Hollandais espérantistes avec, peut-être, un petit groupe d'Espagnols.

L'assemblée générale est close à 12 h. 30.

Le secrétaire de séance : M. MICHAUD.

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon, noir	:	0,80
couleur	:	1,00
Cuillères de collection	:	15,00
Pendentifs	:	15,00
Pendentifs grosse étoile	:	25,00
Coupe-papier	:	25,00
Disques de stationnement	:	5,00
Etoiles pour vitres de voitures	:	3,00

Pensez à acheter :

FALSAJ AMIKOJ

en Esperanto

de R. Bernard et A. Ribot

3,50 F. (+ port : 4,45 F.)

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude
Vos dictionnaires
Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

à M. CIRET
« La Timeraie »
VIEIL-BAUGÉ - 49150 BAUGÉ

Etablir les chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 20 Fr.

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ

de P. Babin

Prix : **18,00 Fr.** + Frais d'envoi

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 40,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

LES EXTRAITS DE NOTRE CATALOGUE

...aujourd'hui

LA PLENA ILUSTRITA VORTARO

Un outil indispensable pour apprendre et pratiquer la langue internationale